


# Nozibele kaj la tri haroj



Tessa Welch ✎  
Wiehan de Jager 🗣️  
dohliam 📄  
3 ||  
Esperanto ☺️




# Global Storybooks

[globalstorybooks.net](http://globalstorybooks.net)

## Nozibele kaj la tri haroj

Tessa Welch ✎  
Wiehan de Jager 🗣️  
dohliam 📄



This work is licensed under a Creative Commons  
[Attribution 3.0 International License.](https://creativecommons.org/licenses/by/3.0)  
<https://creativecommons.org/licenses/by/3.0>





Antaŭ longa tempo tri knabinoj eliris  
por kolekti brullignon.



Varmegis, do ili iris malsupren al la rivero por naĝi. Ili ludis kaj ŝprucis kaj naĝis en la akvo.



Tiam ekkonsciis la hundo ke Nozibele trompis lin. Do li kuris kaj kuris la tutan vojon al la vilaĝo. Sed la fratoj de Nozibele atendis tie kun grandaj bastonoj. La hundo turnis sin kaj forkuris, kaj poste ĝi ne revidiĝis.



Subite ili ekkonsciis ke estas jam malfrue. Ili rapidis hejmen al la vilaĝo.



Kiam la hundo revenis, li serĉis Nozibele. "Nozibele, kie vi estas?" li kriis. "Mi estas ĉi tie, sub la lito," diris la unua haro. "Mi estas ĉi tie, malantaŭ la pordo," diris la dua haro. "Mi estas ĉi tie, en la ĉirkaŭbarejo," diris la tria haro.



Kiam ili preskaŭ alvenis hejmen,  
Nozibele metis sian manon sur la  
kolon. Ŝia kolĉeno estis forgesita!  
"Mi petas, revenu kun mi!" ŝi petis  
siajn amikojn. Sed ŝiaj amikoj diris  
ke estis jam tro malfrue.



Tuj kiam la hundo foriris, Nozibele  
prenis tri harojn de sia kapo. Ŝi  
metis unu haron sub la liton, unu  
malantaŭ la pordon kaj unu en la  
ĉirkaŭbarejon. Tiam ŝi kuris hejmen  
laŭeble plej rapide.




Do Nozibele reiris sola al la rivero. Ŝi trovis la kolĉenon kaj rapidis hejmen. Sed ŝi perdiĝis en la mallumo.



Ĉiutage ŝi devis kuiru kaj balai kaj lavi por la hundo. Tiam, iun tagon, la hundo diris, "Nozibele, hodiaŭ mi devas viziti iujn amikojn. Balau la domon, kuiru la manĝaĵon kaj lavu miajn vestaĵojn antaŭ ol mi revenos."



Malproksime ŝi vidis lumon el kabano. Ŝi rapidis al ĝi kaj frapis je la pordo.



Tiam la hundo diris, "Ordigu la liton por mi!" Nozibele respondis, "Mi neniam ordigis liton por hundo." "Ordigu la liton, alie mi mordos vin!" diris la hundo. Do Nozibele ordigis la liton.



Surprize al ŝi, hundo malfermis la pordon kaj diris, "Kion vi volas?" "Mi perdiĝas kaj bezonas lokon por dormi," diris Nozibele. "Eniru, alie mi mordos vin!" diris la hundo. Do Nozibele eniris.



Tiam la hundo diris, "Kuiru por mi!" "Sed mi neniam kuiris por hundo antaŭe," ŝi respondis. "Kuiru, alie mi mordos vin!" diris la hundo. Do Nozibele kuiris iom da manĝaĵo por la hundo.